

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Profektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, advok., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 183**  
**16. 3. 1924**

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,05 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto  
sufiĉis maksimume 50%; por ĉiuj alla-  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.,  
en „Internacia Komercio“ la duoble.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

## Senhalta aktiveco en ĉiuj landoj.

Novaj, gravaj sukcesoj en București, Lyon kaj aliloke.

### Esperanto deviga objekto ĉe la Policoficira Lernejo en Bukurești.

La unua oficiala ekzameno.

Laŭ informo ĵus ricevita, la Ĝenerala Direkcio de la Rumana Polica kaj Ŝtata Sekureco enkondukis Esperanton en la Bukureŝtan Policoficiran Lernejon, kiel devigan objekton, kaj la unua oficiala ekzameno okazis la 25 februaro.

En venonta numero ni publikigos detalan raporton pri tiu ĉi sukceso.

### Internacia sukceso en Lyon.

Ĉe la internacia kongreso por scienca akcelo de ekonomiaj interrilatoj, okazinta okaze de la foiro de Lyon, s-o Bobin, reprezentanto de „Esperanto et Commerce“, kaj D-o Privat, delegito de la Itala Komercia Cambro por Svislando, prezentis raportojn pri la utileco de helpa mondlingvo kaj la rezultoj de la konferenco de Venezia. Ilia vidpunkto estis kontraŭbatalata de Prof. Aniaux el Bruxelles, kiu prezidis la kunsidon. Trafte respondis D-o Privat, Profesoro Antonelli el Lyon kaj s-o Kenn, del. de ĥinaj komercaj ĉambroj, kies parolado en Esperanto tre impresis la aŭdiantaron.

Fine la kongreso voĉdonis unuanime escepte la voĉon de la prezidento rezolucion aprobante la decidojn de la konferenco de Venezia kaj konsilante la instruadon kaj uzon de Esperanto por faciligi la komercajn interrilatojn.

### Raporto de la registaro de Genève pri Esperanto.

La registaro de la respubliko kaj kantono de Genève ĵus publikigis raporton de la lerneja direkto pri la eksperimenta instruado deviga de Esperanto dum du jaroj en la lasta grado de la elementaj lernejoj.

La raporto konstata, ke la geknaboj sukcesis paroli kaj skribi la lingvon post naŭmonata kurso kun du lecionoj semajne, kaj ke tiu lernado bone influis la studon de gramatiko en la gepatra lingvo.

### Deviga instruo de Esperanto en Parisa lernejo.

Esperanto estas nun devige instruata en la supera komerca lernejo virina de Paris.

### Esperanto enkondukita en la unua Blindul-Instituto de Polujo en Bydgoszcz.

Novan venkon de Esperanto en Polujo ni povas noti. La unua kaj sola Blindul-Instituto en Polujo en Bydgoszcz enkondukis la instruon de Esperanto. Post longa malfacila klopodado de s-o Glowczynski, blindul- kaj ekzam. Esperanto-instruisto, la direktoro de la instituto s-o Hausner donis finkonvinkite la permeson instrui al blinduloj Esperanton. Menciinde estas, ke jam antaŭ kelkaj jaroj, kiam la instituto posedis germanojn, instruis tie Esperanton kun granda sukceso s-o Pankratz, nuna pola sejmdeputito. Oni tiam konstatis, ke la plej malfeliĉaj inter ni Esperanton pli rapide lernas kaj ĝenerale pli multe interesiĝas je la lernita objekto ol vidantoj kaj baldaŭ praktike uzis Esperanton, legante Esperanto-gazetojn en Braille-skribo kaj korespondante kun esperantaj blinduloj en aliaj landoj. — Ĉe la nun ĉiumarde kaj -vendrede okazanta instruo provizore partoprenas ĉ. 30 p.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.



Unu el la glaci-kavernoj en Tennen-montaro.

## Salzburg, sur la vojo al la Deksesa.

Salzburg estas tre vidinda kaj vizitinda urbo. Ĉiusemere alvenas miloj da fremduloj por ĝui la ĉarman aspekton. Tiel aprobiĝas la eldiro de la fame konata Al. Humboldt, ke Salzburg estas la plej bela urbo de la alpoj. Je limo de krute suprenirantaj montaroj komencas mole ondiga ebenaĵo per multformaj montetoj. La monahomonto, meze en la urbo, estas kronita per impona foriĉaĵo, kaj ne malpli ol ĝi la divers-epokaj konstruaĵoj en la urbocentro rakontas pri multcentjara historio, dum belegaj ĝardenoj kaj promenoj okazas la urbon per delikata ĉarmo.

En tia revemiga ĉirkaŭaĵo povis esti naskata la plej fama muzikartisto Mozart, kaj ankoraŭ hodiaŭ muzikemo kaj ĝojsentemo apartenas al la karakterizo de bona salzburgano.

Opinante, ke ĉi tiun someron okaze de la Deksesa en Wien multaj samideanoj travojaĝante povos viziti nian urbon, la „Salzburga Esperantista Grupo“ jam nun diskonigas, ke ĝi tre volonte zorgos pri loĝigo kaj gvidado tra la vidindaĵoj, precipe ke ĝi estas preta aranĝi ekskurson al la antaŭ ne longe trovitaj glaci-kavernoj en Tennen-montaro, kiuj estas la plej grandaj en la tuta mondo. Ilustraĵo montras la aspekton de la kaverno nur vizitebla de bone ekipitaj turistoj.

Detalojn pri la kavernoj volonte havigas: Asocio por kaverno-esplorado kaj kaverno-scienca D-o Angermaier, Bismarckstr. 16, Salzburg.

Sed por ĉion bone prepari estas dezirinde, ke la vizitontoj sufiĉe frue sin anoncu ĉe la UEA-delegito J. Vogel, Wolfdietrichstr., Salzburg, Aŭstrio.

### Sinjoro Herriot kaj Esperanto

Profitante sian vojaĝon al Lyon, D-o Privat vizitis kun s-o Bobin kaj Profesoro Antonelli la urbestron, s-o Herriot, kiu ludas nun gravan rolon kiel kandidato al la franca ĉefministreco. S-o Herriot certigis kaj konsentis, ke oni publikigu lian malaprobacion al la fama cirkulero Bérard kontraŭ Esperanto kaj lian opinion, ke devo de respublika registaro estus, nuligi lian malpermeson, ĉar la registaro devus kontraŭe faciligi ĉiujn rimedojn por akceli la rektajn rilatojn inter la popoloj.

### Parolado de D-o Privat per radiotelefonio.

La 31 marto, lundon vespere je 21 h (centra eŭropa), UEA disaŭdigis el la radiostacio de Genève (1100 m) esperantan paroladon de D-o Privat al la esperantistaro post kelkaj klarigoj en franca lingvo.

Ĉiuj aŭdintoj bonvolu nepre sendi poŝkarton al UEA, 12 Boulevard du Théâtre, Genève, por ke oni sciigu ĝis kiu distanco la stacio de Genève sendpovas.

### Oficialigo de Esperanto en la internacia rilato de la Poŝto kaj Telegrafo.

Kiel oni jam scias, la Dekkvina en Nürnberg unuanime akceptis rezolucion pri petkskribo al la Internacia Poŝta kaj la Telegrafa Unuiĝo permesi la uzadon de Esperanto kiel neŭtralan internacian lingvon en la interrilatoj administraciaj de la Poŝto kaj de la Telegrafo kaj kiel telegramlingvon „klarajn“ proponitan de la Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj (Ilepio). Laŭ interkonsento kun la estraro de la koncerna internacia ofico, ambaŭ peticioj devas esti akompanotaj de multaj ĉiulandaj kaj bonaj subskriboj de esperantistoj kaj esperantemaj personoj, firmaoj, societoj, administracioj kaj geoficistoj ĉiusepecaj, kiel firma subtenadesprimoj. Ni presigis 2000 listoparojn po 50 subskriblinioj kaj forsendis ilin al la Esperantoredakcioj, -societoj kaj UEA-delegitoj de ĉiu iom granda urbo de la tuta mondo por subskribigo kaj kolektado de subskriboj eble plej multnombraj, kun klariganta cirkulero. Sed ĝis nun, fine de febr. 1924, ni bedaŭrege ricevis nur 260 listoparojn kun entute ĉirkaŭ 15000 duoblaj subskriboj aŭ stampoj (samaj por poŝto kiel por telegrafo) el 18 landoj. La plimulto el Germanujo, Estonio, Polujo, Svislando, Ĉeĥoslovakio kaj Nederlando. Ŝajnas ke multaj samideanoj kaj delegitoj tute ne komprenas la gravecon de tiu ĉi oficialigo de Esperanto, ne okupas sin pri tiu vere propagandoforta subskribigo, estante tute indiferentaj, aŭ eĉ ne subskribis mem kaj ne resendis al ni almenaŭ la nur parte plenigitajn aŭ malplenaĵajn listojn. Tamen por nur parte sukcesigi niajn peticiojn kaj savi Esperanton de la ĉiama mondlingva haoso kaj necerteco, ni bezonas almenaŭ 20000 duoblajn subskribojn aŭ stampojn el eĉ pli multaj landoj. La 4 junio 1924 malfermiĝos en Stockholm la Internacia Kongreso de la Poŝta Unuiĝo kaj pli poste ie tiu de la Telegrafio. Tiuj ĉi kongresoj okazas nur tre malofte, kaj se ni ne sukcesas konvinki ilin nun pri la granda disvastigo, utileco kaj internacieco de Esperanto, niaj celoj estas kaj restos vanaj. Do, nun aŭ neniam! Dum la monato de marto ni adresos al ĉiuj registaroj kaj poŝtministerioj presitan esperanto-tekstan peticion, petante ilin studi la aferon kaj



interesigi iliajn kongresdelegitojn. Kopiojn ni sendos al ĉiulandaj fervoraj delegitoj de UEA kaj de Ileprio kun la peto sendi ilin ankaŭ al iliaj registaroj aŭ poŝtministerioj kun la nacilingva traduko, propra rekomendletero kaj iu bona propaganda broŝuro aŭ ĵurnalo. Fine de aprilo ni adrosos nian ĉefpeticion al la Poŝta kaj al la Telegrafa Unuiĝoj kunmetante la subskribolistojn, statistikojn kaj bonajn propagandilojn. Samtempe ni petas ĉiun fervoran samideanon, delegiton, societon aŭ grupon adresi de si mem leteron aŭ poŝtkarton (nepre ne-illustritan) en Esperanto al la Internacia Poŝta Unuiĝo aŭ Telegrafa Unio en Bern (Svislando), aŭ al sia registaro aŭ poŝta ministerio, rekomendante Esperanton kiel internacian lingvon administracian. Kunhelpu do kaj resendu baldaŭ al ni la tute aŭ parte plenajn subskriblistojn, kaj la necesega sukceso ne mankos. Kun kora danko kaj plej sinceraj salutoj: la komisiita vicprezidanto de Ileprio: D-o Ed. Spielmann, del. de UEA, P. K. 174, Transit, Bern, Svislando.

**Propaganda Semajno en Sofia.**

La esperantistoj en Bulgario unuaj el siaj samcelanoj en la mondo uzis la amasan propagandon per la tiel nomita propaganda aŭ „verda“ semajno. Pro la neatendite bonaj rezultoj, kiujn tiu propagando portas, ni deziras konigi nian agadon kaj niajn sukcesojn al la tutmonda esperantistaro.

La propaganda semajno estis unufoje organizita en la pasinta jaro 1925. Sed por diversaj objektivaj kaj subjektivaj kaŭzoj ĝi ne donis rezultojn en tia grado, kiam oni atendis. Tamen oni konsciis la gravecon de simila semajno kaj la X. Bulgara Esp. Kongreso decidis, ke la propaganda semajno restu tradicio — ĉiujare en la komenco de novembro ni organizu similan semajnon, dum kiu ni streĉos ĉiujn niajn fortojn por pli efike propagandi. Pro lokaj kaŭzoj ni ne povis organizi nian duan propagandan semajnon dum novembro 1923 kaj ĝi estis prokrastita ĝis la fino de februaro 1924.

La „verda“ semajno komenciĝis je 24 februaro kaj daŭris ĝis 2 marto. La antaŭpreparoj estis grandaj. La Bulgara Esperantista Societo prestigis 15 000 ekz. de plej diversaj kaj diverstekstaj afiŝoj kaj alvokoj, kiuj estis dissendataj en ĉiujn lokojn de la lando kie estas esperantistoj. La ĵurnaloj raportis pri la preparoj okaze de la „verda“ semajno.

Diverskoloraj kaj diverstekstaj afiŝoj (15 specoj) ornamis Sofion jam je 22 februaro. Estis anoncita do publikaj kunvenoj: 24 februaro (en la komenco de la propaganda semajno) kaj 2 marto (en la fino) kaj senpaga kurso de Esperanto en 3 lecionoj.

La kunveno je 24 febr. posttagmeze estis vera sukceso por nia propagando. La granda universitata aŭditorio estis plenplena je aŭskultantoj. Prezidis universitata profesoro D-olv. D. Ŝiŝmanov. Laŭ la programo parolis kvar oratoroj, kies diroj, precipe kiam ili tuŝis la internan ideon de Esperanto, elvokis aplaŭdegon de la aŭdiantaro. Plej aplaŭdata estis s-ino Prof. D-o Iv. D. Ŝiŝmanov, kiu parolis pri siaj impresoj de la XV-a Universala Kongreso. Krom la kvar oratoroj estis kvina, neantaŭvidita. La okaze ĉeestanta D-o D. Gavrijski, aŭtoro de kelkaj lernolibroj por diversaj fremdaj lingvoj laŭ la metodo de Gaspey-Otto-Sauer (eldonejo J. Gross, Heidelberg), deziris paroli. Per sia bonega parolado kaj per la grandaj laŭdoj al Esperanto, kiujn li faris kiel kompetentulo, funde konante kelkajn el la plej grandaj eŭropaj lingvoj, s-o Gavrijski elvokis neesprimeblan entuziasmon ĉe la ĉeestantoj.

La kunveno finiĝis meze de granda entuziasmo, kiu jam la morgaŭan tagon ricevis sian materialigon en la granda nombro de la dezirintoj tuj komerci lerni la lingvon. Post la kunveno la kunvenintoj vizitis improvizitan ekspozicion de esperantaĵoj.

La morgaŭan tagon estis la unua leciono de la senpaga kurso. La granda aŭditorio ne povis enfeni la multnombrian kursanaron. S-o At. D. Atanasov gvidis la kurson. Je la fino jam multaj povis traduki facilajn frazojn. Ĉiuj estis vere mirigitaj pro la simpleco de la esperanta gramatiko.

Merkrede kaj vendrede estos la du lastaj lecionoj de la senpaga kurso, post kiu sekvos pagata kurso. Vendrede okazos ankaŭ komuna vespermanĝo de la sofiaj esperantistoj. Tiaj estas la rezultoj de la propaganda semajno ĉi tie en la ĉefurbo, kie multaj aferoj pasas nerimarkataj, sed nun oni ĉie povas aŭdi parolon pri Esperanto, kaj eĉ personoj, kiuj jam sabate mokis kaj malatentis Esperanton, dimanĉe vespere ekdecidis ĝin lerni. La sperto jam montras, ke Esperanto pli facile kaj pli baldaŭ venkos, se ĝi ne estas montrata kiel simpla lingvo, sed se ĝi estas ligata kun ideo, ideo pri interfratiĝo kaj paciĝo inter la popoloj. Precipe nun post la granda monda katastrofo kaj en la tempo kiam ĉio bolas kaj pretiĝas por novaj bestaĵoj. La multsuferintaj popoloj devas vidi en Esperanto rimedon savantan el la nuna haoso, kaj nur tiel Esperanto havas sian ekzisti-raĵon, ĉar alie

ĝi estas konsiderata kiel nova superflua lingvo, kiu ankoraŭ pli konfuzigas la lingvan haoson. Ni ankoraŭ ne havas sciigojn pri la agado de la provincaj esperantistoj, sed ni estas certaj ke tie ni akirus plej grandajn sukcesojn. Dank'al la propaganda semajno la esperanta movado en nia lando iĝas amasa popola movado kaj ne plu apartenas al la agadosfero de individuoj. Ni deziras ke la samideanoj en ĉiuj landoj same agu kaj akiru same grandajn sukcesojn.

Dimitr. Simeonov, Sofia.

**XII-a Germana Esperanto-Kongreso**

en Plauen (Vogtlando) Pentekoston 1924 (7-10 junio).

**Sepa komuniko.**

Honora kongresprezidanto estos s-o supera urbestro de Plauen D-o Lehmann.

Kongresejo estos la „Centralhalle“, Plauen, Strassbergerstrasse.

Vi povas ŝpari monon, se vi aliĝas tuj, ĉar post la 31-a de marto plialtiĝos la kotizo, kiu nur ankoraŭ dum marto estos M. 3—, poste M. 4—.

Donacoj. Ni kore dankas al la sendintoj de donacoj kaj esperas je pluaj donacoj, por ke nia kongresa kaso povu „resaniĝi“ post la „valuto-malsano“ de la pasinta jaro. Ankaŭ la plej malgranda donaco helpos!

Mensendojn oni direktu al la subskribinto aŭ al Vogtländische Bank, Plauen, kiu havos poŝtĉekkan konton Leipzig n-o 898. Sed oni samtempe informu la bankon, ke la mono estas uzota por la Esperanto-Kongreso.

Loĝejoj. Bonvolu plej eble baldaŭ skribi al ni precize la daton de via alveno, samtempe sciigante nin, ĉu kaj por kiuj noktoj ni devas prizorgi loĝejon, ĉu en hotelo ĉu private. Ni penos, atingi malaltajn prezojn.

Tre grave estas, ke tiuj gesamideanoj, kiuj alvenos en la suba stacidomo de Plauen (linio Gera-Plauen-Weischlitz) sciigu tion al ni, por ke ili tie povu ricevi siajn kongresafojn. Alle ili devos iri longan vojon por havigi ilin.

Atentu kaj legu ankaŭ niajn antaŭajn komunikaĵojn kaj agu laŭ ili. La programon por nia kongreso oni trovas en n-o 179 de ET.

Fakkunsidoj. Gvidontoj! Faru la tagordojn plej eble rapide kaj sendu ilin tuj al la redakcio de „G.-E.“ kaj „ET“, por ke la partoprenantoj havu okazon, sciigi al vi pluajn tiurilatitajn dezirojn!

Ekspozician kaj librovendon dum la kongres-tagoj aranĝos la unuiĝo de plauenaj librovendistoj. Oni tiurilate skribu al firmo A. Kell's Buchhandlung, Plauen, Marktstraße 15 kaj sendu ekspozician materialon al tiu firmo, kiu jam nun volas propagandi por la kongreso.

Korekto. Eraro estas en nia sesa komuniko (ET 179). La numero de l' poŝtĉeka konto de Vogtländische Bank ne estas 598, sed 898 Leipzig. Koran saluton el la Vogtlando!

Hermann Scheider, Plauen i. V., Morgenbergstr. 47.

**Asocio de germanaj instruistaj esperantistaj.**

La ĉefkunveno de nia asocio okazos dum la germana esp. kongreso en Plauen (Pentekosto 1924).

**Tagordo:**

1. Jarraporto.
2. Kasraporto (Raporto de la kontrolintoj de la kaso).
3. Definitiva decido pri nia aliĝo al Edukista Internacio kaj deviga abono al „Novaj Tempoj.“
4. La ekzamena demando.
5. N. velekto de la estraro.
6. Diversaĵoj.

A. Sohrmann, prez.

**Ĉu rezigni?**

Tre ofte kaj tre multe la esperantistoj parolas pri vortaroj, sed nur malmultaj sufiĉe trafas povas juĝi pri la tuta vortara afero, kaj ankoraŭ pli malmultaj helpas por progresigi ĝin sur la taŭga vojo, kiun tre bone skizis jam nio D-o Zamenhof mem. Oni legu tion, kion li diris pri „Plena Vortarego“ kaj „Provizora Vortarego“ en n-o 58 de siaj „Lingvaj Respondoj“ (nova serio, paĝo 18—19).

Laŭ mia opinio neniu en la tuta samideanaro tiel bone komprenis la intencon de nia majstro, kiel Eugen Wüster, la verkinto de la „Enciklopedia Vortaro“ (aperinta ĉe la eldonejo Hirt & Sohn, Leipzig, Salomonstr. 15), kies unua parto aperis kelkajn tagojn antaŭ nia XV-a en Nürnberg.

**Ĉi tiu Enciklopedia Vortaro estas Kompleta Repertorio**

de la Esperanto-lingvo-provizo, en kiu la tuta materialo estas enregistrita kaj ĉiam, ĝis la eldonfino, enregistrita, kun la celo, fiksi la signifojn, la sinonimikon kaj la frazeologion. — Fari antaŭlaboron por la „Provizora Vortarego“ aludita de D-o Zamenhof, tio estis la ĉefa intenco de Wüster ĉe la verkado de sia verko. Ĝi estas

nepre necesega por nia movado. Ni ne bezonas grandajn vortarojn nacilingve-esperante; des pli ni bezonas tian repertorien de nia ĝisnuna literaturo. Estas preskaŭ nekredible, ke unu sola homo kapablis efektiviĝi tian grandegan laboron.

Ekzistas neniam alia verko en nia vortara literaturo, kiun oni povas kompari kun la E. V. de Wüster. Kvankam ĝi estas verkita esperantegermane (t. e. donante cetere nur la klarigojn de la unuopaj enregistritaj vortoj en germana lingvo), ĝi taŭgas por la tutmonda samideanaro, ankaŭ por tiuj, kiuj ne scipovas la germanan lingvon, ĉar ĝi estas fakte „repertorio“, kies Esperanto-teksto estas „konsilanto“ por ĉiuj, kiuj bezonas esprimon, sed ne volas formi ĝin propraŭtoritate, nek povas pro ĝi traserĉi la tutan literaturon.

Cetere la E. V. de Wüster estas kvazaŭ post-huma verko de Zamenhof mem: per speciala signado de la esprimoj uzitaj de li. Ĝi estas kvazaŭ la granda eldono de liaj „Lingvaj Respondoj“. En mil dubaj okazoj oni ankoraŭ hodiaŭ povas demandi la majstron mem, se oni uzas la E. V., ĝi respondos por li, registrinte kaj ordigante kaj signante lian tutan esprimaron.

Certe ja estas nur tre malmultaj esperantistoj, kiuj estas tiom lertaj, ke ili povas kritiki — kiel samgeniaj — tian sciencan verkon. Mi ĉi tie esprimu la bedaŭron, ke ĝis nun mi nenie en gazetoj legis kontentige profundan kritikon de la E. V. — verŝajne la kritikistoj mutiĝas antaŭ tiu — laŭ la eldiro de holanda samideano — „giganta verko“. Ĉu ĝi restu nekompleta? Ĉu ni, post kiam ni trovis taŭgan „repertoriston“ volas kontentiĝi kun la unua volumo de la verko kaj per indiferenteco malhelpi ion, kion bezonadas kaj bezonados ĉiu esperantisto laboranta sciencas, do, la tuta movado? Mi esprimu la deziron, ke la eldonejo Hirt & Sohn povu daŭrigi la eldonadon de la — jam de du jaroj tute preta — manuskripto, por kiu tagon post tago intertempe nova materialo estas enregistrita.

Estas por mi tute nekompreneble, ke la samideanaro, ricevinte la unuan parton de la E. V., rezignos al la aperigado de la aliaj. Tamen ŝajnas, ke oni devas rezigni, ĉar la eldonejo ĝis nun ne ricevis tiom da mendoj, kiom estas necesaj, por eldoni la duan parton.

Do, zorgu, ke vi havigu al nia movado tiun verkon kompletan! Donu viajn mendojn kiel eble plej baldaŭ al la eldonejo! Legu la novan prospekton tiurilatan, kiun vi baldaŭ ricevos. Ne ricevinte ĝin mendu la prospekton ĉe la firmo.

Por instigi la samideanaron al helpo necesa por tia verko, mi — kiel germano — citu kelkajn liniojn el leteroj de po du anglaj kaj francaj fame konataj esperantistoj:

**S-o Prof. Collinson — University of Liverpool**

skribis al Wüster la jenon: „Per via grandega laboro vi estas farinta netakseblan servon al la esperantistoj ĉie . . . . Tre utila estas miaopinie la de vi sekvitaj principo de maksimuma inkluziv-eco: kreskado, sed kreskado sinsekva, senrompa estas nepre bezono . . . mi kore bonvenigas vian kolekton kaj interpretadon.“

**M. C. Butler, sekr. de la BEA, London:**

La libro estas tiel bona, ke ĝi meritas plej fortan subtenon . . . la germanan lingvon mi bedaŭrinde ne scias — sed tamen per helpado de mallongigoj kaj ties klarigoj, mi grandparte komprenas . . .“

**Generalo Sebert skribas al Wüster:**

„ . . . Admirante vian kolosan laboron“

kaj la prezidanto de la Lingva Komitato, profesoro Th. Cart, konstatas: „Al ĉiuj ĝi (la vortaro) estos utila, tre utila . . . Vin oni nur povas danki por tiel granda laboro, kiun, mi esperas, vi povas konduki al ĝia fino . . . sed ĝi (la Lingva Komitato) ne estas la pioniro, kiu marŝas antaŭe kaj antaŭen, tio vi estas . . . kaj por tio ni ĉiuj estas al vi dankaj.“

Helpu, samideanoj, konduki la „kolosan laboron“ ĝis fino, mendante la novajn partojn de la vortaro kaj anoncante vian helpon kiel eble plej baldaŭ.

Espereble la mendoj venos tiom baldaŭ, ke — kiel la unua parto de la E. V. aperis antaŭ la XV-a — la dua kaj tria partoj povas esti prezentotaj al la XVI-a, kaj la tuta al la Internacia Kongreso dum la jubilea jaro 1927, kiam oni festos la 40-an datrevenon de la unua publika paŝo de Esperanto.

Prof D-o Dietterle, Direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

Por la „Kroniko“  
uzu telegram-stilon !!



# Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciligojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unufolien akribila, sed ne inter-administrat al privataj sciligoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

## Aŭstrio.

Fohnsdorf. Kurso komenciĝis por 50 popollernantoj de la lasta klaso kun konsento de la landlerneja konsilantaro en Graz. La gelnantojn lernas kun granda ĝojo kaj fervoro. Kursgvidanto estas s-o Rud. v. Lidl, mineja oficisto.

Linz. Kontraŭe al antiaĵ sciligoj oni informas nin, ke la movado tie ĉi progresas.

S-o Meisleder, pol. rev. imp. kaj s-o Kronberger propagandis en gazetoj. La 12 febr. komenciĝis kurso kun 52 partoprenantoj, inter kiuj estas granda nombro da akademiuloj kaj kelkaj instruistoj. La perspektivo do estas bona.

## Finlando.

Helsinki. La 25 febr. la Esp. societo „Fratero“ en Kallio la en Helsinki aranĝis progresintan festeton. Paroladis s-o Leo Rautanen, deklamis lino lilila Lehtela, bone redaktitan sietan gazeteton „Alvokon“ legis ĉef-edaktoro de la gazeteto f-lino Lyyti Selin ktp. Fine oni kantis kaj ludis.

## Germanujo.

Annaberg (Saksujo) S-o instruisto Krämer gvidas — ĝis nun senpage — kurson en la knabina lernejo por 32 k. (kompare: al la samstupa anglingvala sekcio apartenas 51). Li serĉas por siaj 32 knabinoj kaj 25 knaboj korespondad-adresojn el la tuta mondo (15-14 jara).

Liaj detaliaj grandaj elcerpaĵoj el la kalendaro 12 de la broŝuroj de l' foirfoleco de Frankfurt (Raporto pri Venecia kun antaŭparolo de R. Kreuz, prezo nur 1.75 gmk.) estas presataj de kelkaj semajnoj laŭvice de la esperantista loka gazeto „Annaberger Wochenblatt“ en kiu ankaŭ aperas precipe aliaj novaĵoj pri Esperanto.

Wickede (Rheinregiono). S-o Willi Kocks Kemper faris detale sciencan parolon pri „Esenco kaj valoro de Esperanto“ en la geinstruistaro de la ĉirkaŭaĵo. Estos aranĝata esp. kurso.

Selb (Bavarujo). La Esp. Asocio aranĝis je dimanĉo 15 aprilo pilgrimadon al la Zamenhofa monumento en Franzensbad (Cĥoslovakio) per memorhonori la mortotagon (14 aprilo) de nia majstro.

Rheydt. La loka grupo fondiĝis 1.9.1923. Kunvenoj ĉiun ĵaŭdon je la 20 h. en la restoracio „Zur Post“, Rheydt, Odenkirchnerstr. 55. Bona ŝanco por progresita murjare. L. G. Esperanto Societo „Rejnsto.“ O. Rheydt, Odenkirchnerstr. 55, restoracio „Zur Post“. Prez. Rektoro Mommeritz, vic. prez. Leo Zeys, kas. K. Scheibler, G. instr. Paul Brendgens. 14 membroj.

## Hungarujo.

Kapoŝvar. Granda Zamenhof-memorfesteno en Kapoŝvar, gvidita de „Kapoŝvara Esperanto-Studento-Asocio“. Granda sukceso. Je la 16 febr. vespere je la 6 h. la asocio faris sian Zamenhof-memorfestenon en la pompkambrado de la urbdomo. Ĉefpunto estis la granda propagandaparolado de s-o prez. Andrej Reaz. Krome parolis s-oj Barsony Konacs, Ungar. Herceĝ, Pajor kaj s-o D-o Ressel.

## Jugoslavio.

Inotaki. La laŭdinda propagando de instruisto s-o Markota donas belajn sukcesojn. Kurso malfarmota.

Krivo dol. Instruisto s-o Zujic, malnova esperantisto, vigle propagandas en la ĉirkaŭaĵo. Kune kun la instruistoj s-o Markota en Inotaki kaj s-o Dominis en Sijaj li studas novajn vojojn de propagando.

Sijaj. La senlaca fervoro de instruisto s-o Dominis sukcesis interesi pli ol 50 personojn por la kurso malfarmota en la loka gimnazio.

Novi. Enthusiama studento s-o Katalinic kun sia onklo komercisto antaŭenpuŝas la movadon. Priintempe nia loko estos komuna ekskurso de la samideanoj el Split kaj Trogir.

Split. La kongresa komitato de la 2a interncas aranĝi „Internacian Semajnon sur Adriatiko“ meze de aŭgusto. La vizitontoj de la 16-a ne preterlasu la okazon viziti la mirindan landon de la suno kaj de la maro kun ĝiaj mil insuloj kaj fiordoj. Por ĉiuj informoj turni vin al la prez. R. Rupčić, Palmira 9, Split. La ĵus fondita Turista Unuiĝo forte subtenas la aranĝojn de la Komitato.

## Polujo.

Krakov. La 24 febr. okazis en la ejo de Krekova Esp. Soc. dancvespero, kiun ĉeestis multaj esperantistoj kaj neŭtraluloj. La profilo de tiu vespereto estas kontentiga.

Warszawa. En la loka rusa gimnazio la 2 marto okazis lekcio pri Esperanto, pri la temo: „Problemo de la lingvo internacia“. Parolis lernanto de la sama lernejo s-o J. Dretwer. Lekcio daŭris 1 1/2 h.

Bydgoszcz. En la oficejo de Pola Esp. Servo estis publike elmetitaj ĝis 30.1.24 la listo de la „Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt-Telegraf-Oficistoj“ en Bern, postulantaj de la „Mondpoŝtoscio“ enkondukon de Esperanto en ĉian poŝtan rileton. Post okazinta publikigo en parto de loka gazetaro, la listojn vigle subskribis tiel esperantistoj kiel ankaŭ amikoj de nia lingvo.

Lublin. Dank' al energio kaj sindona agado de kelkaj samideanoj, esperantista movado en nia urbo akceptas imponajn mezurojn kompare al aliaj lukracelaj movadoj. Malgraŭ la karnavalo, oni amase vizitadas esp. kursojn, pilgrandigante tie la vicon de la „paca batalantaro“. — Konstanta bruo en loka gazetaro daŭras. Kunvenoj de „Lublina Rondo Esperantista“ okazas regulje ĉiun sabato je 7 1/2 h. vesp. de str. Bernardynska 2. — Dum somero oni intencas aranĝi distriktan kunveturon. Esperantistojn el la ĉirkaŭaĵo oni jam nun petas intertrakti kun la grupo.

Kolomyja. Ĉi tie estas ĵus arestita por kaŭzoj nekonaĵ Prof. Kuźma, aŭtoro de la antaŭ nelonge aperinta Esperanto lernolibro por rutenoj.

Oriel-Książecy. Dum kunveno de la „Rondeto de Vilaĝa Junularo“ (15. 12.) okazis parolado „Je memoro de Zamenhof“. — En ĉi tiuj regionoj Esperanto daŭre disvastiĝas. Esperantistoj estas ankaŭ jam trovitaj en la vilaĝoj Dokudów, Perkowice, Ogrodniki.

Poznań. Oni preparas efikan propagadon dum la foiro printempa, okazonta en fino de aprilo. Ĉe ĉi tiea „Pola Esperanto Societo“ malfirmiĝis speciala fakopropaganda sub titolo „Rubus-alena“, kun intenco eldoni malmultekostajn, efikajn Esperanto propagandilojn.

Chojnice. Ĉe loka gimnazio konvokito propagandas sukcese s-o Olszewski, favorata de pastro Dr. Kiostein.

Warszawa. La gvidanto de PEServo, s-o Prengel, gajnis por Esperanto gravan literaturan semajno-gazeton

il. sub titolo „Wiadomości Literackie“ („Literaturaj Sciigoj“). Laŭnece aperos en ĝi pol. esp. literaturaj sciigoj. Konvenan materialon kiel ekz. korespondantojn de eksterlandaj esperantistoj allogitaj al pola literaturo helpe de Esperanto, literaturajn habilaĵojn aŭ similan oni sendu per traduko kaj publikigo al Pola Esp. Servo, gvid. Prengel, Bydgoszcz, Długa 1 (Poltujo). — En kelkaj ĝojoj aperos dank' al klopodoj de kelkaj samideanoj bela ili. gvidlibro tra Varsovio kiel preparilo por la pli-malpli-frue ĉi tie okazonta Esperanto mondkongreso.

## Rusujo.

Caricin. La loka dusemajna ĵurnalo „Plamja“ (Flamo) laŭ iniciato de E. M. Tihonor komencis presadon de mallonga kurso de Esperanto. S. J. Meŝkov.

Oni laŭdu redaktion de „Plamja“, kies adreso estas: Ruslando, Caricin, str. de Urlicki, 12, „Plamja“. (Ne sendu il. kartojn!)

## Socia Vivo.

Efektiva kaŭzo de militoj.

### Finparolo.

II.

Nun mi respondos al s-ano J. W. Leslie, ano de angla movado „Eksterdismo“ (Kibbo Kiff).

Li asertas, ke „solvo de la problemo restas en mensa kaj korpa kuracadoj al la individua homo“, kaj pro tio li proponas „vivi en sanaj kondiĉoj eksterdome kiel eble plej ofte“, opinante, ke „tiamaniere estos starigita nova raso de homoj“.

Mi devas diri al tio, ke laŭ mia opinio tio estas vere bona vojo, tamen bedaŭrinde ne sufiĉa kaj krom tio tro longdaŭra, ĉar atendi ĝis kiam la „eksterdismuloj“ elkreskigos „novan rason“ de tuta homaro, tio signifas riski, ke kun ni povas okazi tio, pri kio estas dirite en iu bela ukraina proverbo: „ĝis kiam suno levigis, roso okulojn elmondetos!“

Fine mi devas respondi al s-ano Alfred Egg, kontraŭdiranta al mi de Biblia vidpunkto. Al tiu ĉi semideano-opozicianto por mi estas certe plej malfacile respondi, ĉar vojoj de pruvoj, je kiuj ni staras, estas ĝuste kontraŭaj: li alvokas al „kredo“, sed mi konfesas nur malkredon, konstantan dubon kaj veron sole de racio. Tamen mi devas laŭ sekreto diri, ĝuste en la orelojn mem de la legantoj de ET, ke feliĉe aŭ malfeliĉe, tamen sendube sur nia tergloblo neniu el t. n. kredemuloj ankoraŭ estis homo plene kaj sole „kredema“: ĝi ĉiam kvankam iomete provas kaj c. las al logikaj pruvoj, t. e. al pruvoj per racio. Same nia estimata s-ano Alfred Egg. Li eĉ en unu loko (en komenco de 2-a kolono de 2-a paĝo de n-o 177 de ET) simple asertas, ke al liaj tezoj oni devas iri „per logika argumentado“.

Tamen mi diros al s-o Egg: se vi mem aspiras ion kun ni pritrakti, ion al ni pruvi „per logika argumentado“, tiam mi volonte estas preta al servoj por tio, kaj mi opinias min rajta je tio, ĉar tio estas jam ne kredo, sed rezonado, dum kiu mi povas disputi per ilo, kiun mi mem persone konfesas sole ĝusta, t. e. per racio. Sed tiam mi devas tuj diri al vi, ke via tuta situacio estas tre evidenta kontraŭdiro al logiko, ĉar vi konfesas samtempe du plene kontraŭajn vojojn: per tute absoluta kredo kaj per racio.

Krom tio mi montris al vi konkretan logikan kontraŭdiron en viaj pruvoj. Vi skribas: „pri la Kreinto ja estas raportite, ke li estas la Amo“. Sed mi demandas vin: ĉu oni eterne plene senkulpan tutan homaron pro la krimo de unu „perfekta“ homo Adamo — ĉu ne estas tio plej granda krimo de Dio mem kontraŭ „la leĝo de Amo“, plej granda el ĉiuj krimoj, kiujn eĉ oni povus eltrovi kaj elpensi?! Krom tio: la „perfekta“ homo Adamo kiamaniere povis plenumi tiom grandan malperfektaĵon kaj krimon kontraŭ Dio kaj samtempe kontraŭ tuta estonta homaro?! Racia logiko montras al ni ĉi tie unu el du tezoj: 1. aŭ Adamo estis perfekta, tiam lia obeo kontraŭ Dio ne estis peka, aŭ 2. li ne estis perfekta kaj estas sama kiel ni ĉiuj pekuloj-mortuloj, tiam tuta via rezonado pri Adamo, kiel tute perfekta Dia kreitaĵo, estas mallogika.

Fine vi asertas, ke kiam „Sinloro de Sinloroj ekstarigos la regnon de Dio sur la tero“, tiam „okazos la volo de Dio tiel sur la tero kiel en ĉielo“, kaj tiam „militoj por ĉiam kaj eterne malaperos“.

Sed bedaŭrinde, estimata s-o Egg, vi ne montris al mi tiujn ĉepitronojn el Evangelio, el kiuj ni povus ekscii, kiom longe ni estas devigataj atendi tiun bonfeliĉan aperon de la bonkora „Volo de Sinloro de Sinloroj“, por ke kun ni ne okazu tiel same, aŭ eĉ eble multe pli malbone, ol kun nia atendo ĝis kiam „leviĝos suno“ e la promesata al ni paradizo de la „eksterdismuloj“!

\* \* \*

Konkludante nun mian respondon al ĉiuj tri miaj kontraŭuloj-opoziciantoj el kelkaj ideal tendoroj, mi deziras je ti kelke da vortoj je mia persona ĝenerala opinio pri pli bona vojo por serĉado de „Vero“ en ĉiuj problemoj de homara mondo. Mi persone opinias, ke koncepto „absoluta vero“ ĝenerale estas logika absurdaĵo kaj estas tre granda kaj tre danĝera absurdaĵo, ĉar ĝi elvokas nepran blindan fanatikcon, kiuj alportis kaj alportas al homoj tre multe da plej teruraj

malfeliĉegoj. Mi persone opinias tamen, ke „Veron“ ne nur oni povas sed eĉ nepre devas serĉi, kaj ĝi estas „vero objektive-relativeca“, kiun ni povas fakte ricevi kaj ekvidi per paca kaj per logika farado de sintezo el ĉiuj subjektive-relativecaj apartaj konceptoj — „veroj“. Dum tuta homara historio miaopinie estis jenaj plej grandaj fanatikuloj: antaŭe — religiuuloj kaj nun — marksanoj. Mi vidas, ke en nia diskutado deziras partopreni religiuuloj, kvankam nun ne estas mezepoka tempo, en kiu ili estis fortaj, kaj nun marksanoj estas fortaj. Sed la lastaj bedaŭrinde nun principe ne deziras partopreni en nia diskutado, kvankam tamen tio estas granda malprofito tiel al ili kiel al ni. Pro tio mi min turnas al ĉiuj kredemuloj, ĉu je Dio (t. e. religiuuloj), ĉu je naturo (t. e. marksanoj kaj aliaj) kun propono foriri el iliaj mallarĝaj senaeraj kaŝtruoj kaj kaĝoj je freŝa libera aero de plej larĝa tutmonda vivo. Kaj tiam vi profunde ekspiru kaj ensorbu en vin ĉiujn nuancojn de tiu ĉi aero, kaj tiam, kaj sole tiam, vi povas ekscii, kiu el ili estas efektive, t. e. relativece, plej bonodora kaj plej perfekta!

## Al la gepoŝtistoj ĉiulandaj!

Al la gesamideanoj tutmondaj!

Terura ekonomia katastrofo en la okupata Rejnlando! Malgranda salajroj, alegeaj prezoj, senlaboreco, malsato, malsanoj, morto pro malfortigo kaj eĉ memmortigo pro malspero! Neniel necese aldoni eĉ unu vorton. Al ĉiuj ja estas konata la mizerego. Ni plenkreskintoj per lastaj fortoj kaj per ekstrema ekstreco kaj energio ja provas superi la malfacilaĵojn kaj elteni la suferojn. Sed vidante la kompatindajn, senkulpan infanojn ni sentas korpdemegan, des pli, ĉar ni mem ne plu kapablas helpi.

Rigardu la malfortajn geatulojn, kiam ili almozpelante iradas de domo al domo, kiam ili migradas tra la stratoj, nur malsufiĉe ŝirmate kontraŭ la malvarmo, kiam ili staras antaŭ la vendejoj, premante kontraŭ la vitrojn la palajn vivajojn kaj sopiregante la por ili ne akireblajn elmetitajn manĝaĵojn. Ĉu ne iusugas vian koron, se vi vidas ilin starantaj ĉe la stratanguloj, havantaj disiritintan siaĵon je la piedoj kaj ĉifonajojn ĉirkaŭ la korpo. Iremantaj pro malvarmo, ŝancelantaj pro malforteco, rigardantaj vin per malĝojaj okuloj kaj prezentantaj al vi per frostigitaj manetoj almeton aŭ aliajn objektojn, por ke vi ion aĉetu? Ŝtato, komunumoj, socioj, komitatoj, unuigoj kaj privatuloj klopodas helpi laŭ povo, prizorgante malkaŝajn nutraĵojn, komunajn, senkostajn regalojn, publikajn varmigejojn ktp. Granda helpo ankaŭ venis jam de la eksterlando. Sed ĉi ĉio ne sufiĉas. Tro granda estas la mizero, tro granda la nombro de l' suferantoj. Vi, gesamideanoj en aliaj landoj, kiuj vi vivas eble en pli feliĉaj ĉirkonstancoj, vi kunhelpu. Ni ja scias, ke oni jam ofte alvokis vian bonfaremon. Tamen ne diru pro tio: „Jen devas helpi, oni ja superŝuitas nin per tiaj.“ Pensu je viaj propraj infanoj, precipe vi, patrinaj, imagu ilin iravigantaj en la sama mizera stato. Ni estas certaj, ke ni ne sensukcese petegas:

„Helpu niajn kompatindajn rejnlandajn infanojn!“

Ni esperantistaj poŝt-kaj telegrafoficistoj de Köln adresas ĉi tiun alvokon unuavice al niaj gesamideanoj ĉiulandaj. Nia celo estas helpe de vi subteni niajn malricajn kolegojn en la okupata Rejnteritorio kaj laŭpove forigi de iliaj infanoj la plej frapejn maldolĉaĵojn de la malfeliĉo. Precipe la oficistoj ja iravigas inter tiuj, kiujn plej forte trafis la fatale katastrofo. Ni estas certaj, ke vi, samideanaj kamaradoj, ne flankenlasos nin, sed ni petas vin, insigu ankaŭ vian neesperantistan kolegon, certe ankaŭ en ilia brusto belas kamarada, helpema koro.

Samtempe ni turnas nin al vi ĉiuj, gesamideanoj en la tuta mondo. Helpu nin en niaj klopodoj, helpu nin sekigi la harmonon, helpu nin plifaciligi al niaj infanoj lian kompatindan sorton. Kaj se vi havas homamantajn konatojn, rakontu al ili pri niaj embarasegoj, certe ankaŭ ili malfarmos siajn bonfaremajn korojn kaj manojn. La plej elaj donacaĵoj — ĉu mono, ĉu vestaĵoj, ĉu nutraĵoj — estas kun danko akceptataj. Ĉion, kion ni ricevos, ni metos je dispono de la koncernaj Superaj Poŝtiredikcioj por disdoni inter la plej multe bezonantoj.

Al ĉiuj donacantoj nian plej koren dankon. Ĉiun sendaĵon ni kvitanco en ĉi tiu gazeto. Oni bonvolu adresi al Conrad Creter, poŝtinspektoro, Köln, Ober-Postdirektion.

Por la esperantistaj gepoŝtistoj de Köln Conrad Creter F-lino Grete Altendorf C. Thoma poŝtinspektoro supera poŝtsekr.

Ĉi tiun alvokon ni urĝe rekomendegas.

Por la Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegrafoficistoj (Ilepto) Otto Reber, Bamberg, supera registra konsilisto, prezidanto.

## Novaj agentejoj!

Por plenumi multajn petojn de francaj samideanoj ni starigis novan agentejon en

### Franĉujo

kiun prenis sur sin Sino A. Farges, 30, rue Ferrandière, Lyon Poŝtĉeka konto 5957 Lyon.

La nova agentejo ankaŭ akceptas reabonojn al nia gazeto.

Laŭ amiko interkonsento nia multjara agento P. Balkanyi, Budapeŝt cedis nian agentecon por

### Hungarujo

al Hungara Esperanto Instituto, Budapeŝt VI, Eötvös-uica 3,

kiu de nun plenumos la samajn funkciojn kiel nia antaŭa agento. Administracio de ET.

## Nova abonprezo!

La daŭrada falo de la hungara krono devigas nin aligi la ponumeran prezon por

Hungarujo al 3000 kr.

Jam antaŭpagitaj abonoj estos liverataj sen prezaligo.



**Membroj en pli ol 40 landoj**

Unua klubo por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, ilustraĵojn, papieronon ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postulu proŝpekton kontraŭ respondekupono de 0-0

**Fr. Jakobin**  
Bahnhofstrasse 29  
Coblentz - Germanujo.

Rimarkinda specialaĵo de niaj produktaĵoj estas la **mikroskopo por lernantoj „Signa“**.

Leĝe protektita! Preferinde uzebla en hejmo kaj lernejo.

Interesatoj tuj postulu specimenon kaj prezon **Officejo por Internacia Komercio Willi Eckert**,  
Ronnstrasse 17, Wilhelmshaven (Germanujo).

**Forster 1 1/2 C. P. Motorbikiklo**  
Garantio: 12 monatoj :: :: :: Modelo 1924



1 cilindro, 2-takta, 140 kb-m, 2 transmisiilo, liberrado, kupligo kaj oportuna rimeno-sistemo, veltur-rapideco 10-15 km pohore, supreniro ĝis 30%. Esenc-konsumo ĉirkaŭ 1 litro da benzino kaj 1/2 oleo po 50 km.

Tuj liverbla el provizejo.

Proŝpektoj (germane kaj france) kaj informoj senpage haveblaj de **Gebr. Forster, fabriko de Motorbikikloj Hinwil (Zürich), Svislando**.

Seriozaj pagokapablaj reprezentantoj serĉataj en la tuta mondo

**Necesaj libroj por literaturaj vesperoj.**

<b>Bennemann: Tra la mondo</b>	or-mk.
Internacia legolibro	
1-a parto: Por komencantoj, 2. eld.	1.-
11-a parto: Por progresintoj	1.50
<b>Dietterle: Vendreda Klubo</b>	
11 originalaj artikoloj	1.60
<b>Forge: Abismoj.</b> Romano originale verkita, broŝ.	1.80
bind.	2.75
<b>Internacia Mondliteraturo</b>	
1-a serio: 10 volumoj, kart. po	1.-
Postulu detalan katalogon!	
<b>Luyken: Stranga Heredaĵo.</b> Romano originale verkita, broŝ.	3.-
bind.	4.-
<b>Privat: Historio de la lingvo Esp.</b>	
Deveno kaj komenco, kart.	1.25
Vivo de Zamenhof (speciala eldono por mez- kaj bonvalutaj landoj)	
kart.	2.-
bind.	3.-

1.- ormarko = 0,24 dolaro aŭ la sama valoro en alia nacia mono.

Sendkostoj: 5% de la pagota sumo.

Novaj verkoj en preparo! Postulu nian katalogon!

**Ferdinand Hirt & Sohn,**  
Esperanto-Fako  
Lepzig.

Ni serĉas perfektan, diligentan **Maŝinkompostiston je Linotipo (simpla)**

por la kompostado de ET kaj de germanlingva ĵurnalo. Kondiĉo: sufiĉa scipovo de Esperanto.

**T. & H. Jung, Horrem b. Köln**

**Avizo.**

Le esp. eldonejo Butin & Jung en Godesberg estas ĉesigita. La verkoj aperintaj ĉe la eldonejo Butin & Jung estas transprenitaj de la eldonejo T. & H. Jung (Esperanto Triumfonta) en Horrem bei Köln, Germ.

**6. BIS 12. APRIL**

AUSKUNFT MESSE AM FRANKFURT A.M.



**Internacia Foiro de Frankfurt a.M.**  
6-12 aprilo.

Ĉiu anglalingva instruanto de Esperanto aĉetu **„SPOKEN ESPERANTO“**

instruilon por instruanto kaj instruotaj seriozaj laŭ la moderna, rekta, direkte sukcesa metodo.

92 paĝoj, kun rika ilustro, \$ 0.55 (2 por \$ 1.00) afrank. ĉien

**N. W. Frost,**  
12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass., Usono.

**La Batalanto Eldonejo**

**Hannover**  
(Germanlando) Hermannstr. 19

**serĉas interrilatojn**

kun aliaj eldonejoj kaj librovendejoj  
:: kaj reprezentantojn en ĉiuj landoj. ::

**Anoncetoj.**

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĝigo, edziĝo, morto, okazontaĵoj gravaj esp. kunvenoj festoj k.s.) senpage.

Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj esprisoj, kostas po du esprisoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas deprezi la pagon de la abonkoto, ĝuas por propra anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.- mk, prefere prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas aŭti 12 tagojn antaŭ publikigo.

**FIANĜIGO.** F-ino Grete Altendorf, Köln, Friesenwall 58, fianĝigis kun s-o H. Hurler, Köln, Hansaring 51, III. [1]

**EDZIĜO.** Okazis en Kraków edziĝo de s-o Leopold Goldberger, dentkuracisto, kun f-ino Giza Manderer. Al novedziĝintoj - vigla kasisto kaj ĉarma membrino - kore gratulas Krakova Esp. Societo. [2]

**POR ESPERANTA LIGILO.** Pasintan Kristnaskon nia samideano s-o Hurler, d-nicis iere interesan, bele binditan libron al ni nomata „Por la batalinto!“, bonega esperanta traduko de fama romano „Die Waffen nieder!“ de Bertha von Suttner. Kiel eble jam ĉiuj sciis, „Esperanta Ligo“ bezonas multan monhelpon kaj tial ni decidis lofi tiun libron je la profito de tiu gazeto. Ni havas kvindek lotojn po duono da ormarko la loto minimume. Kiu deziras preni loton, sendu la monon, do minimume duonon da ormarko po loto, al ges-o Zapater, Moltkestr. 101, Köln am Rhein, Germ. [1]

**BANKFIRMAO, INTERNACIA KOMERCO AŬ INDUSTRIO.** Dana bankisto, kiu je 1 aprilo forlasas sian nunan pozicion ĉe bankfirmao en Auerbach, serĉas novan en Germanujo, Francujo aŭ Anglujo. Parolas la germanan, anglan, skandinavan kaj la esperantan lingvojn. Turunu vin al s-o Hugo Gerisch, Auerbach (Vgll), Germ. aŭ al del. M. Mammen, Grenaa, Danujo, aŭ al bankisto H. Madsen, Kaiserstr. 16, Auerbach (Vgll), Germ. - 15-jara sperteco. [1]

**RAPIDI!** Pro likvidado estas disvendataj kun 50%o rabato la lastaj cent ekzempleroj de la interesplenaj verkoj: La bulgara lando kaj popolo 2 sv. fk., El la proksima oriento 1,25 sv. fk., Bulgara - Esp. kaj Esp. Bulg. Vorlaro 2 sv. fk. Ĉiuj kune nur por 5 sv. fk. afrankite. La unuaj dudek kvin mendintoj ricevos aldonon „Bukedeto“ kun antaŭparolo de Marie Hankel. Mendu tuj ĉe la aŭtoro: Iv. H. Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresden A. 16, Germanujo. [1]

**ITALA DOKTORO** pri ekonomi-komercaj sciencoj, fraŭlo, 24-jara, tre volonte sin okupas ĉe granda industrio kiel kontrolanto aŭ ĉef-librotenisto, aŭ kiel administranto ĉe grava riĉa familio. aŭ ĉe serioza instituto kiel oficisto. Eksterlandanoj sendu tuj proponon n esperante itale, france, aŭ angle al D-o Vito de Benedetto, del. de UEA, Lecce, Sud Italujo. [1]

**Korespondo kaj interŝanĝo.**

10 diversaj germanaj miliardo-provizoroj, neuzitaj, kontraŭ antaŭa sendo de 0,40 d-laro aŭ poŝtmarkoj de via lando laŭ sama valoro. Mi ne sendas unue. Hermann Albrecht, Köln, Am Zuckerberg 8, Germ. (Rekom. de la redakcio.) [2]

Atentu! Sekve de eraro en ET n-o 178, 179 estas enpresita malkorekte adreso de sinjoro Rundberg. La ĝusta adreso estas: s-o Yrjö Rundberg, Hiekkä Vuorikatu 1, Viipuri, Finlando. [1]

S-o Yrjö Rundberg, Hiekkä Vuorikatu 1, Viipuri, Finlando, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. [2]

S-o Augusto Kiss, arĥitekturo, Rákospalota, Örház u. 19, Hung., deziras interŝanĝi pm kun tiumondo, certe resendanda. Mi vendas por 5 sv. fk. 150 diversajn nedefektajn pm. [2]

F-ino Erna Tietze, Annenstr. 28, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondi per il. pk. kaj l. ankaŭ interŝanĝas pm. Respondos ĉiam. [2]

F-ino Frida Kunth, Gotthardstr. 50, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondi per il. pk. kun ĉiuj landoj. [2]

F-ino Marie Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg (Saale), Germ., deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Otto Klapper, Luisenstr. 10, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondi per il. pk. kaj interŝanĝo de pm. [2]

S-o Karl Lohmann, Hallesche Str. 7, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Hermann Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas il. pk. pri tipoj kaj naciaj kostumoj, ankaŭ pm. kaj fotografiojn. [2]

S-o Arrigo Tonino, Via Asio M. Volpe 45, Udine, Italujo, korespondas per l. Interŝanĝas kun la tuta mondo il. pk., pm., papieronon, moneritojn, fotografiojn (kostumojn), revuon, ĵurnalojn kaj librojn en Esperanto. Korespondas ankaŭ en franca lingvo. [2]

Mi deziras interŝanĝi pm. kaj papieronon kun ĉiuj landoj. Adreso: Stanislaw Dzius, Staro Zagnanska 55, 1. Kłecze, Polujo. [2]

Kelkaj anoj de la Heldera Societo Esperantista deziras korespondi per il. pk. kaj l., kaj interŝanĝi ekspoziciematerialon (gazetojn naciajn kaj esperantajn, fotojn de gesamideanoj ktp.) La societo garantias respondon! Adresu al la sekretariejo de la Heldera Societo Esperantista Nova Sento, Dozhof 5, Helder (N H), Nederl. [2]

Al miaj korespondantoj: Bonvolu resendi viajn adresojn. Miaj biblioteko kaj adresoj forbrulis en granda fajro en Rabaul. Mihaelo Ahang, Box 54, Rabaul, New Guinea, via Australia. [1]

Mi deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj de la tuta mondo, speciale Turkujo. Alois Miksch, Flurschützstr. 10-17, Wien 12, Aŭstrio. [1]

S-o A. Meus, Appelstraat 57, Borgerhout, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi kun usonaj, prefere kaliforniail fraŭlinoj, per il. pk. [1]

S-o Konstantino Smirnov, Sokolniki, Ogorodnaja 22, Moskva, Rusujo, deziras korespondi kun alilandanoj pri turismo, literaturo, librotekado kaj interŝanĝi per gvidlibrojn, ĵurnalojn, fotografiojn, pk., esperantaj ktp. Respondas ĉiam akurate. [1]

S-o G. C. ter Morshuizen, Dibbetsstraat 56, Hago, Nederlando, deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Mi respondos kiel eble plej baldaŭ. [1]

S-o Antonio Balacz, Telegraf Centro, Santa Clara, Kubo, deziras interŝanĝi il. pk. kaj l. kun gesamideanoj de la tuta mondo. Mi serĉas seriozajn gekorespondantojn. Mi ĉiam respondos. [1]

Esp. gele-nantoj (12-25 jaroj) deziras korespondi kaj interŝanĝi per il. Pk. Pm. kaj l. kun la tuta mondo. Skribu unue al Walter Grober, instruisto, Naundorf b. Lauchhammer (Germanujo). [1]

F-ino Bice Jerrari, Corso Vittorio Emanuele 10, kaj f-ino Anna Ballini, Via Gh. luzi 10, Mantova, Italujo, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per il. Pk. kaj l. pri ĉiutaga vivo [1]

Du novaj samideanoj, gimnazianoj, deziras interkorespondadi kun gesamideanoj de la tuta mondo. Stefan Petrov, Aleksandrovska 115, kaj Nikola Zazarov, Okr. bulevardo 39, Rusĉuk, Bulgario. [1]

Por 50 geknaboj 13-16 jaraj el diversaj kursoj oni petas korespondantojn per il. Pk. kaj l. Sin tujni al s-o M. Racoux, instruisto, Place Sommeleville, Verviers, Belgujo [1]

S-o M. Bräunlein, Gugelstr. 21, Nürnberg, Germ., deziras korespondi k. ĉ. l. per pk. kaj l. Mi sendas monon kaj pm. Tuj respondon! [1]

Malkare! Por 1 sv. fk. aŭ egalvaloru mi elsendas 10 soveterusajn plus 10 polaj Pm. Ĉiuj diversaj, bonkvalitaj, nedefektaj, plenan seriojn! Isaj Dratwer, Muranowska 26/32, Warszawa, Polujo. [1]

Juna baletistino (35 j.) deziras korespondi kaj estosi dankema, se oni sendos mod-ĵurnalojn de vintura sezono. Ruslando, Bobruisk Min. Gub., Socialistsĉeskaĵ 198. [1]

S-o Erich Sackwitz, Karlstr. 11, p., Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondi per l. il. pk. kun ĉiuj landoj pri interesaj temoj. Interŝanĝas helmonon. [2]

S-o Ewald Schwarzkopf, Hallesche Str. 3, 1. Merseburg (Saale), Germ., deziras interŝanĝi papieronon el ĉiuj landoj kaj fotografiojn de la gesamideanoj. [1]

S-o Alfred Liebig, Obersteigensdorf, Bahnhof, Silezjo, Germanujo serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ĉiam respondos. [1]